

Joseph Döpjohann,
La birdokanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi aŭdis birdokanton,
belege sonis ĝi;
mi volis ĝin kompreni,
ravita estis mi.

Ĝi kantis frumatene -
trankvilo ĉie ĉi;
forĝesis mi la zorgojn,
rekonsoliĝis mi.

Momenton mi ekpensis
ne plu pri l' taglabor';
mi volis pluaŭskulti,
sed devis iri for.

Vesper' fariĝis baldaŭ,
rapidis hejmen mi,
por aŭdi mian birdon;
sed ne revenis ĝi.

*Traduko de la Basgermana poemo "De Vugelleed" de JOSEPH DÜPJOHANN (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, *1930-10-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-03-19.*

MR-401-1 / Arg-249-505 (2004-06-30 15:20:30)

Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Döpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.